# EKO 2022

Esperiga Komuniko

Subtene al la regiona, landa kaj loka agado

UEA

ilei

IF EF

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek, Gbeglo Koffi, Elda Doerfler



**ENHAVO n-ro 46>** ● AMO kuba ● ALTE ● DR Kongo ● BET ripet' **< aŭgusto 22**


## AMO oriente, okcidente tra Kubo

Jen la decido pri AMO-Seminario en Kubo. Pro la landa situacio ekonomia, kiu ege malfaciligas transporteblojn pro la kostoj, ni decidis okazigi la seminarion en du momentoj, unue por la centrokcidenta parto de nia lando, kaj poste por la orienta regiono. Tial moviĝos nur la instruontoj/trejnistoj kaj certe ni havos pli da partoprenantoj.

Temo: Postpandemia restarto en Kubo

Datoj: 7-9 oktobro en Havano / 16-18 decembro Guantánamo

Nun ni eklaboras en la preparo de la koncernaj materialoj. Ni restos en kontakto.

Maritza

## ALTE tenu la standardon!

La konferenco de ALTE (Asocio de Lingvo-Testistoj en Eŭropo), okazonta en novembro, estos parte hibrida, do reta kaj ĉeesta. La temo estas tre konvena. La malplej parolataj lingvoj el la vidpunkto de plurlingveco'.

https://www.alte.org/event-4685276

Por UEA planas la partoprenon la kutima reprezentanto, s-ino Zsófia Kóródy.

## Medicina multlingveco – almenaŭ eŭropa

Pretiĝis ankaŭ la angla-Esperanta-pola medicina tradukhelpilo post la angla-Esperanta-hispana, angla-Esperanta-germana, angla-Esperanta-slovaka kaj angla-Esperanta-hungara versioj. Tio atendas ankoraŭ la patrinlingvan provlegadon. Samtempe komenciĝis la kompilado de la angla-Esperanta-ĉeĥa versio.

Dankegon al ĉiuj ĉeĥaj, germanaj, hispanaj, polaj, slovakaj, hungaraj volontuloj, kiuj ŝatas helpi kaj la ukrainiajn rifuĝintojn kaj la medicinistojn, kiuj prizorgas ilin.

Nia laborgrupo uzis la eminentan libron de D-ro Gert Hoyer kaj D-rino Uta Hoyer: 'Ärztlicher Dolmetscher, 2., erweiterte Auflage', Johann Ambrosius Barth, Leipzig, 1980.' La libro estas ankoraŭ aĉetebla helpe de musklako al:

https://www.booklooker.de/B%C3%BCcher/Gert-und-Uta-Hoyer+%C3%84rztlicher-Dolmetscher/id/A02yhEgQ01ZZe ...

Estus grave pretigi ankaŭ la ukrainlingvan tradukon.

Ni bezonas ukrainian kolegon, kiu povas traduki la tekston en la ukrainan lingvon, kaj kiu havas komputilon kaj ukrainlingvan klavaron.

Plusendis: Ludoviko Molnár, prezidanto de la Budapeŝta Medicina Esperanto-Fakgrupo

## Afrika muziko

Jam ronde spektiĝas la kanzono en la reto. La konga artisto Joe Mo revenis sur la scenejon kun nova muzikpeco titolita *AKE-2022 Senegalo* Kanto per kiu li celebras ĝisnunajn atingojn el vidpunkto de renkontiĝoj kaj omaĝas al esperantistaj aktivuloj sur la hejmkontinento de la homaro. La reveno al la muzika scenejo de Joe Mo ne okazis tra la malgranda pordo. Li revenas kun kanto, kiu forte reklamas la ĉi-jaran Afrikan Kongreson kun bela sono. Agnoskante, ke "novaj amikoj konatiĝas", li koncedas ke oni interkulture pri multo spertiĝas dum Esperanto-renkontiĝoj, kio gravas en esperantista vivo.

La filmeto bone ilustras la titolon de la kanto, montrante bildojn, sur kiuj oni vidas la kongreslandon, kongresejon, kelkajn dumkongresajn ekskursejojn. Ekplanu vojaĝon al la gastama urbo Tieso en Senegalo ĉi-jarfine (SMG: EKO baldaŭ raportos pri tio).

Resume, temas pri muzikpeco, kiu alvokas ajnajn esperantistojn kaj simpatiantojn tra la mondo aliĝi kaj partopreni la 8-an Afrikan Kongreson de Esperanto. Ligilo al la muzikaĵo: https://www.youtube.com/watch?v=Ct-uiiMsUYo.

Adje Adjevi

## Virinoj en DR Kongo marŝas por sano!

Okaze de la Esperanto-Tago, ni Eo-virinoj en Kinŝaso organizis piedmarŝon por la sano en aŭgusto 2022. La celo de tiu evento estas vivigi la lingvon Esperanto kaj allogi homojn al nia movado. Estas ĝojinde ke ni sukcesis tiun agadon, kaj unu junulo rekte interesiĝis pri la lingvo Esperanto, li komencos lerni Esperanton venont-semajne en la klubo EGSR.
Ni preparas debatan konferencon en novembro 2022 kun la temo: "la ekzisto kaj la graveco de la lingvo Esperanto en la mondo". Viaj konsiloj, subtenoj, helpoj estos bonvenaj. Ni deziras organizi varbadon plu en nia ĉirkaŭaĵo. sed mankas al ni rimedoj, mi petas al ĉiu homo kiu povas kaj volas la antaŭenigon de tiu ĉi lingvo, turnu vin al ni ĉar ni pretas fari propagandojn.



Alexandrine Omba

## Instruado en Sud-Ameriko

Mi invitas vin partopreni la 2-an VERSo-n, kiu okazos la 17-an de septembro 2022 de la 17-a ĝis la 21-a horo UTC. Nia temo estos: **"Kiel plifortigi la movadon en Sudameriko - la rolo de instruado kaj praktikado."** Ni planas diskutrondon pri: **"Esperanto en Universitatoj de Sudameriko"**
https://www.aerj.org.br/verso

https://eventaservo.org/e/f5c471

Aristophio Filho, sekciestro de ILEI en Brazilo

## Diskonigi sciaĵojn helpe de la Vikimediaj projektoj

Dum unu semajno kaptu la okazon pli bone koni la vikimediajn projektojn : Vikipedio, Vikivojaĝo, Vikivortaro ktp. Ekkonu la historion de tiu tutmonda multlingva kunlabora projektaro, kian gravecon havas Esperanto en ĝi, kaj kiel la Vikimediaj projektoj kontribuas al la fortikigo de la Esperanta kulturo.

Vi povos ankaŭ trejniĝi por kontribui kaj konstatos, kiel facile estas ekkontribui, kaj kiel gravas respekti bazajn regulojn por garantii kiel eble plej grandan fidindecon al tiu kolektiva verko.

Ni kune kreos kaj/aŭ plibonigos artikolojn pri lokaj temoj (kiaj Bureso, Civaux, kaj aliaj),iliaj historio, monumentoj kaj aliaj rimarkindaĵoj, helpante nin de dokumentoj kaj enketante surloke.

Ĉiu partoprenanto estos instigita plu kontribuadi, ekzemple same enketante pri propra hejmregiono aŭ pri iu ajn temo, por kiu ŝi/li havas intereson, ŝaton kaj apartan kompetenton. La semajnon gvidos Arno Lagrange, aktiva vikipediisto de multaj jaroj.

Arno Lagrange

## Greziljono invitas denove

Inter aŭgusto 29-a kaj septembro 2-a okazos praktikado de la lingvo plurnivela

La kurso koncernas komencintojn kaj progresantojn. Studado okazos en etaj grupoj, per adaptita pedagogio kaj familieca etoso.

Catherine Kremer, profesia ĉiĉeronino, zorgos pri la paroliga kurso: La temo de ŝi plej ŝatata por paroligi homojn estas "turismo".

Venu kaj kunportu anekdotojn aŭ legendojn rilate vian regionon. Aldone, se vi posedas malnovajn dokumentojn rilate viajn praulojn, familianojn, ekz. fotojn, ne hezitu kunporti ilin por libere prezenti diversajn temojn al la grupo.

La kursoj okazos matene. Posttagmeze (lunde, marde, ĵaŭde, vendrede) inter la 17a kaj la 19a ni vizitos atelieron* en apuda vilaĝo. Tie kun artistino ni lernos :

- tinkturi teksaĵojn per naturaj rimedoj
- krei ornamaĵojn el la naturaĵoj, ktp.

Atentu, ke la partopreno en la posttagmezaj atelieroj necesigos krompagon je 30 €.

Catherine Kremer

## Premiita muzikaĵo en Belartaj Konkursoj

Xavier Rodon (Kaj Tiel Plu) kantas "Menestrelo". La teksto de ĉi kanto ricevis (en egaleco kun la teksto "Ne foriru") la unuan premion en la branĉo KANTOTEKSTO de la Belartaj Konkursoj de UEA en 2022.

https://youtu.be/cLuXF27EK8U

La tekston verkis Nikolaj Nechajev, la muzikon komponis Liven Dek kaj la harmonizon kaj orkestradon faris Antero Ávila. La muzikigo de la kanto estas parto el la premioj, kiujn ricevas la aŭtoro.

mga

## Postsekvoj de BET en Klaipeda

Hodiaŭ en la novaĵretejo "La Ondo de Esperanto" aperis artikolo de Gražina Opulskienė pri BET-56, kiu okazis ĉi-julie en Klajpedo (Litovio) kun 263 aliĝintoj, el kiuj ĉ. 230 reale partoprenis. Legu ĉe: https://sezonoj.ru/2022/08/bet-137/

## Unika kurso speciale por blinduloj

De: **edukado.net** <redaktanto@edukado.net>

La redaktoro de edukado.net informas vin ke aldoniĝis nova ero ĉe la Kursejo.

Nomo: Baza kurso por nevidantoj
Gvidantonomo: Nedeljka LOŽAJIĆ (la sekretario de LIBE)
Tipo: Nova movada kurso
Loko: Beogrado, Serbio

Aldoninto: aranka
Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: https://edukado.net/kursejo?kid=27437

## Prepare al ekzamenoj en DR Kongo

La Esperanto-Kursaro Tibor Sekelj de ILEI, kunlabore kun la Universitato Espero en Barako, DR Kongo, anoncas novan kurson de Esperanto por afrikaj progresantoj por atingi la nivelon B2 de la KER-ekzamenoj. Ekde la 24-a de septembro 2022 je la 9:00 horo UTC-a en ĉiu sabato. Aliĝu per mesaĝo al irlei@espero.ir

## Pardonpeto: peko de EKO

Ni bone koncias, ke ni tro tuja post EKO 45 dissendas ĉi tion, sed por eKO 47 mi jam havas sep paĝojn da materialo, el kiu tri paĝoj transiros al EKO 47 aŭ 48. Kreeble EKO 47 temos ekskluzive pri informoj el la rezultoj de la Kongreso (UK).

========= vortoj: 1170 =========

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2700 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝis majo 2022 (per EKO 2022-25). Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro depost 2014.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.